

BEÏNSA DUNÓ



LA MONDO
DE
LA GRANDAI
ANIMOJ

Beinsa Duno

LA PAROLO
SUR
LA MONTARO

Esperantigis : P. G. PAMPOROV

Sofia, 1933.

Esperanta presejo „KULTURA“ — Sofia

SALUTON

al:

La lumaj mensoj,
La perfektaj animoj,
La noblaj koroj —
— al ĉiuj, kiuj pensas, kiujn ni konas kaj
kiuj nin konas —
en la mondo de la reala kaj la neŝanĝebla.
La grundo, kiu staras estas firma.
La arbo, kiu staras kaj kreskas, estas pa-
cienca.
La akvo, kiu fluas, estas pura.
La aero, kiu blovas, estas freŝa.
La lumo, kiu lumas, estas forta kaj viva.
Kaj la homo, kiu pensas, estas racia kaj
feliĉa, ĉar en li mem — vivo, scio, lumo, libero
kaj amo — en perfekta pleneco kunfluas.

*

VALORAJ PENSOJ

PRI LA HOMO

La atingita vojo, la leviĝanta vero, la atingita vivo estas por la saĝulo ĝojo, gajeco kaj paco, feliĉo, beato kaj boneco.

Pensu pri la akvo, kiu fluas malsupen, pri la vento, kiu blovas supren, kaj pri la lumo, kiu lumas ĉien.

La pano, malsuprenveninta el la ĉielo, estas por la koro, la penso — por la menso, kaj la laboro — por la homa spirito.

Pensu pri la fontoj de la vivo, de la scio kaj de la libero.

Tio, kio ne malnoviĝas, estas la vesto de la Amo.

Tio, kio ne ŝanĝiĝas, estas la vesto de la Saĝo.

Tio, kio ne perdiĝas, estas la vesto de la Vero.

La leviĝanta stelo montras la belecon de la nokto.

La leviĝanta suno montras la gloron de la tago.

Tion, kio portas tenton kaj ĝojon, kamparon oni nomas.

Tion, kio portas danĝeron kaj purecon,
montaron oni nomas.

Tio, kio, kontentigas la animon estas la Amo.

Tio, kio kontentigas la spiriton, estas la
Saĝo.

Tio, kio donas sencon al ĉio, estas la Vero.

Vojo sen polvo, vero sen dubo kaj vivo
sen sufero, tio estas senmorteco.

Mallumo por la fortuloj, lumo por la mal-
fortuloj, ĉagreno por la sanuloj, ĝojo por la
malsanuloj.

La sanulo ĝoju pri siaj ĉagrenoj kaj la mal-
sanuloj — pri siaj ĝojoj.

La juneco estas la vesto de la vivo.

La lumo estas la vesto de la scio.

La libero estas la vesto de la sano.

Vivo sen virtoj estas simila al ĝardeno sen
floroj, al arboj sen fruktoj.

Ne serĉu tion, kion vi ne bezonas.

Ne portu tion, kio ne kontentigas vin.

Estu ĉiam libera kaj neniam jungiĝu.

Metu la kolbridon ripozu kaj vian forton
labori.

Metu la timon kiel servanto al via racio.

Metu la kompatemon kiel helpanto al via
koro.

Amikiĝu kun tio, kio ne maljuniĝas —
la Amo.

Amikiĝu kun tio, kio ne mallumiĝas —
la Saĝo.

Amikiĝu kun tio, kio ne limiĝas—la Vero.
Komenco de ĉio estas la Spirito.

Komenco de la Spirito estas la Amo.

La Zenito de la Spirito estas la Saĝo.

La fino de ĉiuj aĵoj estas la Vero, kiu
portas liberon.

Fino estas nur tie, kie ĉesas ĉiuj kontraŭ-
diroj.

Komenco estas nur tie, kie ĉio estas en
harmonio.

La mondo estas tio, en kio ĉio manifestiĝas.

Serĉu la devenon de ĉio, por ke vi trovu
la veran Dion en via animo. Li estas nomata la
fortulo en la fortuloj kaj la fortulo en la mal-
fortuloj; la senmortulo en la senmortuloj kaj la
senmortulo en la mortuloj; la amanto en la
amantoj kaj la amanto en la senamantoj. Li pe-
netras ĉion. Kie Li estas, tie estas la Vivo, tie
estas la scio, tie estas la libero. Li estas la
granda sekureco por ĉio.

Ĉagreno estas tio, kion oni ne komprenas.

Ĝojo estas tio, kion oni komprenas.

Tio, kion oni semas, estas ĝojo.

Tio, kio ne ĝermas, estas ĉagreno.

Tio, kion oni rikoltas, estas scio.

Akvo, kiu varmiĝas kaj malvarmiĝas ne estas akvo.

Akvo estas tio, kio ni varmiĝas, ni malvarmiĝas.

Tio, kion oni ne kaptas, estas lumo.

Tio, kion oni ne komprenas, estas amo.

Tio, kion oni ne atingas, estas libero.

La nekaptebla estas la lumo.

La nekomprenebla estas la amo.

La neatingebla estas la libero.

Ne estiĝu antaŭtempe pordo por la mondo,
ĉar ĉiuj trapasados ĝin.

Pensu pri la tri fontoj de la vivo, kiuj neniam malpuriĝas. Ili estas: vivo sen sufero, penso sen dabo, kaj libero sen limigo.

Renkontu tiun, kiu malsupreniras.

Akompanu tiun, kiu supreniras.

Serĉu tion, kio ne perdas sian dolĉecon.

Serĉu tion, kio ne perdas sian lumon.

Ne fidu al la malforteco.

Serĉu la komunikon de la racio.

Akceptu tiun, kiu neniam estas invitita.

Satnutru tiun, kiu neniam estas nutrita.

Ne supreniru sekan arbon.

Serĉu kampon, kiu ne estas plugita, ĝardenon, kiu ne estas fosita kaj vinberejon, kiu ne estas rikoltita.

Sur vojo pordon ne metu.

Sur glacio domon ne konstruu.
 Tio, kion oni ne forgesas, estas vera.
 Tio, kion oni forgesas, estas efemera.
 Malsaton sen pano oni memoras, kun pano
 oni forgesas.

Kiam vi ekiras, portu la timon sur via dorso.
 Kiam vi haltas, portu la amon en via koro.
 Nutru la senesperigitan, levu la falintan.
 Amu la grenon kaj vi ĉiam estos kontenta.
 Tri aĵojn en la vivo ne evitu: akvor, kiu
 fluas, venton, kiu blovas kaj lumon, kiu lumas.
 Tri ecojn tenu konstante en via vivo: pa-
 con, kiu estas en la koro, lumon, kiu loĝas en
 la menso kaj ĝojon, kiu laboras en la animo.
 Kiam vi perdas la sencon de la vivo, serĉu
 tion, kio lumas; serĉu tion, kio brulas; serĉu
 tion, kio ne haltas.

Leviĝu frue, kiam la malriĉeco frapas.
 Enlitiĝu frue, kiam la riĉeco ekiras.
 Manĝu, kiam la sateco estas jam forinta.
 Ripozu, kiam la malsateco estas veninta.
 Parolu, kiam oni demandas vin.
 Silentu, kiam oni karesas vin.
 Ne faru surtombajn ŝtonojn sur via eraĵoj.
 Ne ligu sonorilojn al viaj virtoj.
 En fenditan teleron manĝaĵon ne metu.
 Kun truita kruĉo por akvo ne iru.
 Sur ĉevalon sen brido ne supreniru.

En domo sen tegmento ne loĝu.
Sur malseka fajrujo panon ne baku.
Lernu ĉe tiu, kiu portas la lumon.
Eduku vin ĉe tiu, kiu portas la varmon.
Aŭskultu nur tiun, kiu ĉiam helpas.
Ne lavu vin en rivero, kiu fonton ne havas.
Ne supreniru sur montpinton, kiu manojn
ne havas.

Tio, kio ne laciĝas vivo estas.

La virto vivas nur ĉe tio, kio neniam
estingiĝas.

La virto vivas nur ĉe tio, kio ĉiam ĝojas.

Nur la spirado de la Unika, Eternulo vivigas
ĉion.

*

ENIGMOJ EN LA VIVO.

Ŝlosilo, per kiu vi ne povas malŝlosi, ĉu estas ŝlosilo?

Plumo, per kiu vi ne povas skribi, ĉu estas plumo?

Inko, kiu ne kaptiĝas je la plumo, ĉu estas inko?

Libro, kiun oni ne legas, ĉu estas libro?

Piedoj, kiuj ne moviĝas, ĉu estas piedoj?

Manoj, kiuj ne laboras, ĉu estas manoj?

Okuloj, kiuj ne rigardas, ĉu estas okuloj?

Oreloj, kiuj ne aŭskultas, ĉu estas oreloj?

Lango, kiu ne parolas, ĉu estas lango?

Koro, kiu ne sentas, ĉu estas koro?

Menso, kiu ne pensas, ĉu estas menso?

Plugilo, kiu ne povas plugi, ĉu estas plugilo?

Fosilo, kiu ne povas fosi, ĉu estas fosilo?

— Ŝlosilo, kiu malfermas, ŝlosilo estas.

— Plumo, kiu skribas, plumo estas.

— Inko, kiu kaptiĝas je la plumo, inko estas.

— Libro, kiun oni legas, libro estas.

— Piedoj, kiuj moviĝas, piedoj estas.

— Manoj, kiuj laboras, manoj estas.

— Okuloj, kiuj rigardas, okuloj estas,

— Oreloj, kiuj aŭskultas, oreloj estas.

— Lango, kiu parolas, lango estas.

— Koro, kiu sentas, koro estas.

Se la koro ne sentas, la bela ne venos.

— Menso, kiu pensas, menso estas.

Se la menso ne pensas, la granda restos
ne komprenita.

— Plugilo, kiu povas plugi, plugilo estas.

Se la plugilo ne plugas, pano ne estos.

— Fosilo, kiu povas fosi, fosilo estas.

Se la fosilo ne povas fosi, vinbero ne estos.

Ne lasu la boaton en seka loko.

Metu la boaton en akvon kaj ĝi mem ek-
iros.

Kiam la racia supreniras en sian boaton, ĝi
mem ekiras.

Kial vi devas suferi? — Por ke venu la ĝojo.

Kial vi devas vivi? — Por akiri la feliĉon.

Kial vi devas esti bela? — Por ke la amo
vizitu vin.

Bela penso, nobla sento kaj bona ago estas
fidelaj amikoj.

La vera amiko devas esti bela, nobla kaj
bona.

LA PROVA ŜTONO.

Sekvu la luman vojon de la vivo, kie fajro brulas, kie akvo fluas, kie aero blovetas, kie herbo ĝermas, kie floro floras, kie fiŝo naĝas, kie birdo flugas, kie homo pensas, kie la spirito estontecon desegnas kaj la vero reĝas.

Malfermu viajn okulojn, kiam la virto ridetas.

Aŭskultu, kiam la vero parolas.

Laboru, kiam la Spirito de la Saĝo estontecojn desegnas.

Vojo sen lumo, domo sen pordo, rivero sen akvo vantaĵoj estas.

Lumaj pensoj, pura koro, supera animo kaj forta spirito amikoj de la homo estas.

Aŭskultu la instrukciojn de via spirito kaj la gvidadon de via animo, por ke al vi estu ĉiam bone.

En la vojo de la vivo oni provas la kredon kaj la esperon de la homo.

En la vojo de la scio oni provas la menson kaj la volon de la homo.

En la vojo de la libero oni provas la noblecon de la animo kaj la kompatemon de la koro.

Tie, kie la greneto falas, la ŝtono staras.

Tie, kie la ŝtono falas, la greneo tstaras.
Kiam la folioj de la arbo de l' vivo mal-
supreniras, la vintro venas.

Kiam la folioj de la arbo de l' vivo supren-
iras, la printempo venas.

Kiam la malriĉeco frapas sur la pordo, la
malvarmo aperas.

Kiam la riĉeco frapas sur la pordo, la varmo
aperas.

Kiam la malklera regas, polvo leviĝas.

Kiam la racia regas, la paco leviĝas,

Tie, kie la formiko dronas, la homo amuz-
iĝas.

Tie, kie la formiko amuziĝas, la homo dor-
mas.

La stulta aŭskultas per la unu el siaj oreloj,
la racia — per la du, kaj la surda ne interesiĝas
ankaŭ pri la du.

La infano rampas, la junulo supreniras, la
maljunulo sidas, kaj la laca ripozas.

La domo estas por la infano, la kampo —
por la junulo, la plumo — por la maljnulo, kaj
la lito — por la laca. Se vi estas en ja domo —
infano vi estas; se vi estas en la kampo — junulo
vi estas; se vi tenas la plumon — maljunulo vi
estas; se vi estas en la lito — laca vi estas de
la vivo.

Ne difektu tion, kion la naturo ordigis. Ne

donu al la naturo konsilon, kion ĝi faru. Kun ĝi ne konkursu kaj nenion perforte de ĝi prenu. Prenu, kiam la bonulo donas al vi.

Donu, kiam la prudentulo petas de vi.

Domo sen pordo kaj lernejo sen fenestro, similaj estas. Kial ili estas similaj? — Kiel en domo sen pordo neniu povas loĝi, tiel ankaŭ en lernejo sen fenestro nenion oni povas ellerni.

Post kiam vi manĝis dolĉajn fruktojn, ne manĝu maldolĉajn.

Post kiam vi trinkis dolĉan sukron, ne trinku absinton.

Post kiam vi diris kelkajn dolĉajn vortojn al iu, ne vestu ilin per viaj ĉifonoj.

Post kiam vi faris bonon, ne diskonigu ĝin per tamburo.

Post kiam vi estas dirinta grandan penson, ne faru al ĝi malliberejon.

Post kiam vi estas skribinta aman leteron, ne sonu per sonorilo.

Post kiam vi estas regalinta iun, parolu al li pri ĉio, sed ne pri mono. Se vi parolas al li pri mono, vi tentas lin, kaj vin mem domaĝas.

Ne acidiĝu, kiam oni vin fermentigas.

Ne donu vian buteron, kiam oni batas vin.

Ne ploru pri tio, kion vi ne atingis.

Ne danku, kiam ĉiuj laŭdas vin.

Danku nur tiam, kiam vi scias, ke la amo estas kun vi kaj vi vidas kion ĝi faras.

La scio el unu loko ne venas, kaj la lumo tra unu fenestro ne eniras.

Ne kalkuleblaj estas la fenestroj de la lumo.

La amo tra unu buŝo ne parolas. Miloj estas la buŝoj de la amo, tra kiuj ĝi parolas. KREDU en ĉiuj ĝiaj buŝoj.

Unu estas la Spirito, multaj estas la spiritoj.

Unu estas Dio, multaj estas la animoj.

Unu estas Li, multaj estas liaj gefiloj.

La Unu estas la tuto, la multaj estas partoj de la tuto.

Unu estas la nomo de la tuto. nekalkuleblaj estas la nomoj de la partoj.

La vera vojo ne havas vojetojn.

Vojo kiu havas multajn vojetojn, ĝi estas vojo de la malluma mondo.

Vojo, kiu havas neniamajn vojetojn, ĝi estas vojo de la Spirito.

Vojo, kiu havas polvon, ĝi estas vojo de erarigoj.

Vojo, kiu havas nenian polvon, ĝi estas vojo de la lumo.

La malhela ĉielo estas ĉielo de la mallumo.

Vivo plenigita je malfacilaĵoj, estas vivo de sufero.

Vivo plena je bonaĵoj estas vivo de gajeco.

Iru tien, kien la lumo iras.

Malsupreniru tien, kien la akvo malsupreniras.

Laboru tie, kie la Spirito laboras.

La amo vivas, la saĝo lumas kaj la Vero portas la estontecojn.

LA SERĈADO DE LA RACIA

En la vivo serĉu unue la kovrilon, poste — la volvitan, post tio — la semon kaj plej poste — la racian.

Ĉe ĉiuj situoj de la vivo la racia egale manifestiĝas.

Tio, kio mezuras, kaj ĝin oni ne mezuras, estas la racia.

Mezuru per la racia, kiu mezuras kaj ĝin vi ne penu mezuri.

Ne manĝu tre multe, por ke ne estiĝu peze al vi.

Ne trinku tro, por ke via vivo ne fariĝu sensenca.

Ne kresku pli ol estas necese, por ke vi ne rompiĝu.

Ne deziru porti multon, por ke via spino ne fleksiĝu.

Malklaran akvon ne trinku; disŝiritajn ŝuojn ne uzu; sur la stulta ne konstruu.

Kiam la drinkulo parolas, sciu, ke ne li parolas, sed la vino en li. Ĝis nun la vino estas dirinta eĉ ne unu veron.

En la vivo la firmaĵo serĉas la surfacon; la fluidaĵo — la deklivon; la gasa — la amplekson; kaj la lumo — la vastecon.

La spirito kreas, la animo konstruas, la menso ordigas, kaj la koro forŝutas.

Serĉu la amon, kiun ne akompanas la malamo.

Serĉu la justecon, kiun ne akompanas la senjusteco.

Serĉu la veron, kiun ne akompanas la mensogo.

Serĉu la saĝon, kiun ne akompanas la erarigo.

Serĉu la bonon, kiun ne akompanas la malbono.

Tio estas la rekta vojo por la homo, por la disĉiplo, por la kredanto kaj por la inicianto.

Tio estas la vojo, de la eterna supreniranta bonego, kiu beligas la spiriton.

La vojo de la vivo por la malklerulo estas malfacila.

La vojo de la vivo por la klerulo estas facila.

Malfermu la pordon de la vivo, kiam la suno leviĝas.

La komprenita kontraŭdiro por iuj portas ĝojon, por aliaj — malĝojon.

Se vi ĉagreniĝas pri tio, kion vi komprenis, vi ne estas koninta la vivon.

Se vi ĝojas pri tio, kion vi komprenis, vi perceptis la lumajn flankojn de la vivo.

Portu la bruligitan kandelon antaŭ vin kaj via vojo estos lumigita.

Pensu nur pri tio, kio portas vivon en si mem.

Se vi deziras esti sana, pensu pri la ĝojo kaj gajeco.

Se vi deziras esti riĉa, pensu pri la scio kaj la pacienco.

Se vi deziras esti forta, pensu pri la lumo.

Se vi deziras neniam faleti, estu ĉiam kontenta sen ia ajn kaŭzo.

Estu kontenta en via malkontenteco.

Estu ĝoja en via ĉagreno.

Estu gaja en via malsukceso.

La sukceso por unu estas malsukceso por alia.

La malsukceso por alia estas sukceso por vi.

Se vi vidas, ke iu pekas, veninta estas la tempo por ke vi fariĝu virta.

Se vi vidas la sanktulon kaj vi ne komprenas lian sanktecon, estas kondiĉoj por ke vi falu.

Ne atendu multon de fajro, kie ĉio bruliĝas.
 Ne atendu multon de riĉaĵo, kie ĉio perdiĝas.

Ne atendu multon de tago, en kiu la suno subiras.

Ne bedaŭru pri tio, kion vi forgesis.

Ĝoju pri tio, kion vi memoras.

Ne kalkulu la rompitaĵn kruĉojn de viaj proksimuloj.

Ne haltu por kalkuli la polverojn sur la vojo.

Por la disŝiritaj ĉifonoj ne ploru.

Al la malpura akvo monumenton ne starigu.

Ne serĉu la bonon, kiu tentas—ĝi ne estas por vi.

Ne serĉu la riĉaĵon, kiu lacigas—ĝi ne estas por vi.

Ne serĉu la scion, kiu malordigas — ĝi ne estas por vi.

Memoru: vi ne estas sendita en la mondon por solvi ĉiujn kontraŭdirojn.

Vi estas sendita por vivi. Se vi ellernos tion, vi multon akiros; se vi ne ellernos tion, vi multe ankoraŭ fleksiĝos.

Sciu, ke la vojoj de la leviĝanta suno kaj la vojoj de la subiranta suno diferenciĝas.

La vojoj de la juna kaj maljuna, de la bona kaj malbona, de la amanta kaj malam-

anta, de la saĝa kaj malsaĝa, de la homama
kaj de la perfortulo ankaŭ diferenciĝas.

Ne bedaŭru, ke vi havas nur unu buŝon.

Ne ĉagrenu, ke vi havas nur unu langon.

Ne maltrankviliĝu, ke al vi estas restintaj
nur du piedoj.

Ne revu havi du kapojn.

Kiam vi laboras, teĥu viajn manojn tran-
kvilaj.

Ne alkroĉu kurtenon sur viaj okuloj.

Ne estingu la kandelojn de via koro, kiam
la suno leviĝas.

Ne ŝiru la florojn, kiam ili floras.

Amu la lumon kaj estu libera.

*

LA TAGOJ DE LA ESTADO

Konsideru la unuan tagon — tago de via spirito — tago, en kiu la lumo manifestiĝis.

Konsideru la duan tagon — tago de via animo — tago, en kiu la amo manifestiĝis.

Konsideru la trian tagon — tago de via menso — tago, en kiu la scio elmontriĝis.

Konsideru la kvaran tagon — tago de via koro — tago, en kiu la konscia vivo manifestiĝis.

Konsideru la kvinan tagon — tago de via volo — tago de viaj fortoj, kiuj venis por helpi al vi.

Konsideru la sesan tagon — tago de la Eterna Parolo, kiu lumigis vin kaj metis vin reganto de via sorto.

Konsideru la sepan tagon — tago de Dio, la Eterna Principo de ĉio — tago de la naturo, el kiu ĉiu devas lerni — tago de via ripozo, kiam vi servas al ĉiuj virtoj.

Memoru, ke vi estas naskita por esti racia.
Ne donu lokon al la malracieco.

Memoru:

Kiu sekvas la vojon de la vero, tiu estas ĉiam libera.

Kiu sekvas la vojon de la bono, tiu estas ĉiam bona.

Kiu sekvas la vojon de la saĝo, tiu estas ĉiam racia.

Gardu nemakulita la sanktan ligon kun Tiu, Kiu naskis vin. Nur tiam vi akiros tion, al kio vi sopiras: forton, belecon, bonecon kaj raciecon.

Se en la vojo de l' vivo, en kiu vi estas ekirinta, via stelo konstante leviĝas, vi estas en la vojo de la lumo.

Se en la vojo, en kiu vi estas ekirinta, via stelo konstante subiras, vi estas en la vojo de la mallumo.

Sekvu la vojon de la akvo: kie vi pasas, lavu kaj ĉion akvumu. Kion ajn trovas vi survoje, levu, ordigu, metu en la ĝustan lokon kvan-kam vi povas malpurigi.

Iru tien, kien oni vin invitas.

Eliru de tie, de kie oni vin pelas.

La juna fraŭlino la akvon ne invitas, ŝi mem iras por ĉerpi kaj alporti ĝin.

Iam la belaj semoj ankaŭ en la koto bone kreskas.

Koto, kiun vi ne povas utiligi en laboro, montras vian malklerecon.

Koto, kiun vi povas utiligi en laboro, montras vian scion.

La akvo estas kaj en la oceano, kaj en la maro, kaj en la lago, kaj en la marĉeto kaj en la pluvaj gutoj, sed diverse manifestiĝas.

En la oceano la akvo donas regalon al la fiŝegoj, en la maro — la junajn amuzas, en la lago — la malgrandajn prizorgas, en la marĉeto — lasas la ranojn somere en seka loko.

Se vi estas en regalo, vi estas en oceano.

Se vi estas en amuzo, vi estas en la maro.

Se vi ŝanceliĝas kiel folio, vi estas en la lago.

Se vi estas sen monero en via poŝo, vi estas en la marĉeto.

Kiam la marĉeto sekiĝas, la ranoj komencas salti de unu loko al alia. Ili similas al la infanetoj, kiuj transsaltas la ŝnuregon de unu kaj de alia flanko.

Ĉu vi devas plori por la sekiĝinta marĉeto de la suferoj?

Ĉu vi devas malesperi por la sekiĝinta marĉeto de la turmento?

Sekvu la vojon de la ranoj. Ĉar la ranoj plej multe kantas kiam alproksimiĝas la tempo ke la marĉeto sekiĝu. La vortoj de la rana kanto estas: kum-kvo-kva — venis tempo de la homa savo. En la komenco de la somero vi aŭskultas la komunikon de tiuj profetoj, kiuj vokas el la

sekiĝintaj marĉoj: rekonsciiĝu, homoj, kaj ekmarŝu la vojon, kiu kondukas al la granda maro.

Ĉiu formo de la Spirito estas surskribita folio de la granda libro de la vivo. Beata estas tiu, kiu povas legi tiun folion.

Estas du gravaj libroj: la libro de la vivo kaj la libro de la morto. La folioj de la libro de l' vivo nek malnoviĝas nek sekiĝas, nek estas deŝireblaj, nek perdiĝas. Ili ĉiam estas sanaj, sukplenaĵoj kiel la freŝaj fruktoj.

La folioj de la libro de l' morto estas sekaj kaj disŝetitaj sur la tuta tero. Ne ploru pri ĝiaj sekiĝintaj folioj. Ne malĝoju pri ĝiaj folioj, disŝetitaj sur la tuta tero.

Benita estas tiu domo, kiu estas purigita de la sekiĝintaj folioj de la morto.

Menso, loĝita per lumaj pensoj, koro, loĝata de lumaj sentoj kaj volo, manifestiĝanto de noblaj agoj, estas la eternaj impulsoj de la Spirito de l' bono. Senĉese sekvu tiun vojon.

Kiam la mastro venas, la pordo malfermiĝas.

Kiam la mastro eniras, la pordo fermiĝas.

Kiam la Spirito venas, la pordo de via koro malfermiĝas.

Kiam la Spirito eniras, la pordo de via koro fermiĝas.

Ĉiu malfermado kaj fermado de la pordo estas finita racia proceso.

Ne malfermu la pordon antaŭ ol la Spirito estu veninta.

Ne fermu la pordon, antaŭ ol la Spirito estu enirinta.

*

LA BONA VESTO.

Kiam la malvarmo venas gastu, vestu vian plej dikan veston.

Kiam la varmo venas gastu, vestu vian plej maldikan veston.

Kiam la malsato venas gastu, fermu viajn du pordojn.

Kiam la sato venas gastu, malfermu viajn du pordojn.

Kiam vi estas sana, laboru.

Kiam vi estas malsana, ripozu.

Kiam vi estas malriĉulo, ĝoju.

Kiam vi estas riĉulo, ploru.

Eltiru la putritan el la ŝnurego, por ke vi saviĝu de la granda malfeliĉo, kiu atendas vin.

Ekbruligu la kandelon de via vivo, por ke la tuta vivo havu sencon.

Post kiam unu laboro estas finita, nur tiam ĝi akiras sian prezon kaj forton.

La semo ĝermas, kiam ĝi estas semita.

La akvo lavas, kiam ĝi estas verŝita.

La kandelo lumas, kiam ĝi estas bruligita.

Ĉiu bona laboro estas komenco de la racia en la mondo.

La sunradio montras la leviĝon de la Suno.

La suno parolas pri sia reganto.

La rosa guto parolas pri la forto de la suna varmo.

La floro parolas pri la forto de la Dia Amo, kiu kreskigas ĉion en la mondo.

Se vi pensas ke la mondo estas kreita por vi, demandu vin, por kiu vi estas kreita?

Se la mondo ne havas rilaton al vi, tiam demandu vin, kia estas via rilato al vi mem?

Se vi pensas, ke vi estas el la raciaj, demandu vin, kial vi maltrankviliĝas?

Se vi pensas, ke vi estas el la fortuloj, demandu vin, kial vi bezonas kuraciston?

Se vi pensas, ke vi estas el la riĉuloj, demandu vin, kial vi bezonas ke oni donu al vi?

Se vi pensas, ke vi estas el la sentimuloj, demandu vin, kial via koro tremas?

Demandu la patrinon, kial estas al ŝi la infano?

Demandu la fiŝon, kial ĝi bezonas la akvon.

Demandu la lernanton, kial al li estas la libro.

Demandu la veturilon, kial ĝi havas radojn.

Demandu la vinberujon, kial ĝi havas vinberon.

Demandu fine vin mem, kial estas donitaj al vi la suferoj.

Se vi parolas pri la suno kaj vi ne vidas ĝin; se vi parolas pri la libro kaj vi ne povas legi ĝin; se vi deziras la akvon kaj vi ne povas trinki ĝin; se vi serĉas la panon kaj vi ne povas manĝi ĝin; se vi serĉas la amon, kaj vi ne povas ricevi ĝin, kion vi estas akirinta? Se vi post ĉiuj viaj penoj similas al disŝirita ĉifono, kion vi estas atinginta?

Se la servisto balais la domon kaj levis la tutan polvon en ĝi, ĉu li purigis la domon de la polvo? La plej sendanĝeran en la domo la servisto estas elportinta eksteren, sed la plej danĝeran, la polvon, li estas lasinta interne. Demandu vin tiam, kiom kostas tia balaado.

La polvon oni purigas nur per akvo, sed ne per balailo.

La akvon oni metas en laboron nur ĉe varmo.

La varmon oni metas en laboron nur ĉe lumo.

La lumon oni metas en laboron nur en la ĉeesto de l' menso.

Se la frukto scias, de kie ĝi estas deŝirita kaj kien oni metis ĝin, sed ne scias kiam ĝi revenos, ĉu oni povas diri, kiom la frukto estas ellerninta?

LA VALORA EN LA VIVO

La polvoplena puriĝu de sia poivo.

La kotoplena puriĝu de sia koto.

La malriĉulo solvu la taskon de la malriĉeco.

La riĉulo solvu la taskon de la riĉaĵo.

La scienculo solvu la problemon de sia scio.

La bonulo obeu sian raciecon.

La amanto servu al sia proksimulo.

Nur la libera akvo fluas kaj nur la libera vivo kreskas.

La akvo, kiu fluas, serĉas la soifanton.

La vivo, kiu kreskas, serĉas la malriĉulon.

Se vi estas soifanta, la akvo estas por vi.

Se vi estas malriĉulo, la vivo estas por vi.

La riĉaĵo estas limo por la malriĉulo, por ke li trovu sian vivon.

La malriĉaĵo estas limo por la riĉulo, por ke li ne perdu sian vivon.

Kie estas malriĉaĵo kaj riĉaĵo, tie estas la vivo.

Konu la amon, per kiu la amanto vivigas vin.

Konu la saĝon, per kiu la saĝulo savigas vin.

Konu la veron, per kiu la fortulo savas vin.

Ne fermu la fenestron de via vivo, kiam
via amiko ridetas al vi.

Ne enmetu nescion en la scion.

Ne senkrediĝu en via kredo.

Ne enportu mensogon en la veron.

Ne leĝigu la sklavecon en la libero.

Sur vojon kun unu piedo ne ekiru.

Sur kampon kun unu mano ne iru.

Al la saĝulo kun unu okulo ne iru.

Staru sur viaj piedoj.

Laboru per viaj manoj.

Rigardu per viaj okuloj.

Aŭskultu per viaj oreloj.

Parolu per via lango.

Pensu per via menso.

Sentu per via koro.

Amu per via animo.

Servu per via spirito.

Menso sen kontraŭdiroj, koro sen ĉagrenoj
kaj tumultoj, fundo sen koto, dezireblaj bonaĵoj
estas.

Faru malbonon al neniu.

Ne kuraĝigu la krimulon.

Ne liberigu la malbonulon.

Ne ligu la virtulon.

Senvestiĝu el la tempa vesto de l' vivo
kaj vestiĝu en la eterna.

Senvestiĝu de la senforto kaj vestiĝu en la forto.

Senvestiĝu de la senamo kaj vestiĝu en la amo.

Senvestiĝu de la sklaveco kaj vestiĝu en la libero.

Senvestiĝu de la mensogo kaj vestiĝu en la vero.

Racia estas tiu, kiu povas ŝanĝi la ĉagrenon en konsolo.

Racia estas tiu, kiu povas ŝanĝi la mal-esperon en espero.

Racia estas tiu, kiu povas ŝanĝi la malamon en amo.

Racia estas tiu, kiu povas ŝanĝi la nekle-recon en scio.

Racia estas tiu, kiu povas ŝanĝi la mal-justecon en justeco.

Racia estas tiu, kiu povas ŝanĝi la sklavecon en libero.

Racia estas tiu, kiu povas ŝanĝi la mal-riĉaĵon en riĉaĵo.

Racia estas tiu, kiu povas ŝanĝi la morton en vivo.

Racia estas tiu, kiu eĉ en la plej granda mallumo povas trovi la vojon al Dio — la Eterna kaj la neŝanĝebla Amo de la Estado.

Mendebla ĉe Redakcio
„ĴITNO ZARNO“, poŝtkesto 271
Sofio, Bulgarujo.